



Pos-Amiko

IJK 2022, vendredo, numero 48

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

Pos-Amiko nun havebla en 133 lingvoj!

Almenaŭ se vi akceptas la tradukkkvaliton de Google Translate, ĉar mi mem scipovas nur paroli en Esperanto kaj la koka.

Fama muzikala kolektivo perdita en Esperantujo

Survoje al iu granda teatro grupo de famaj aktoroj, kantistoj kaj reĝisoro perdiĝis kaj devis tranokti en la kongresejo de la IJK. Almenaŭ tio estas la plej verŝajna klarigo por tio, kion la esperantistoj hodiaŭ vidis dum la 78-a IJK.

Sur la scenejo, kie kutime ludas neprofesiaj artistoj aŭ senhontaj partoprenantoj, hodiaŭ ludiĝis altnivela, profesia muzikalo, kiu povus konkurenci kun la famaj en Broadway, kaj en kelkaj momentoj superis ajnan. La aktoroj montris siajn talentojn al imponita publiko, flugante de sceno al sceno. Spektantoj perdas ajnan senton pri tempopaso.

La redakcio de la Pos-Amiko komencis esploron, kiu povus esti la mistera muzikalgrupo. Neniu teatro en Londono aŭ Nov-Jorko raportis mankantajn aktorojn, kaj la faritaj fotoj de la misteraj aktoroj ne korespondas al ajna artikolo en imdb.com. Krome neniu konata muzikalo ŝajne iam montriĝis en la lingvo Esperanto, krom unu nemenciinda okazo en 1997 en Assisi.

Do kiuj estas tiuj homoj? Ĉu iuj rusaj aktoroj, kiuj fuĝas la militon? Tiam tamen ne la plej konataj. Aŭ ĉu la grupo estis frostita sub glacio dum kvindek jaroj, antaŭ la tempo de interreto kaj vikipedio? Tiam certe la glacio bonege konservis ilin, kaj ni esperu ke la tutmonda varmiĝo baldaŭ portos pliajn tiajn stelulojn al ni!

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Reenŝaltu la vifimodemon, tio kutime solvas la problemon.

Taŭro: Ne timu inojn, ili ne mordos vin kiel hundo kiam vi alproksimiĝas.

Ĝemeloj: Lerni nacian lingvon necesas por komuniki en nacia Esperanto-kongreso.

Kankro: Ĉu ankaŭ tio estas tradicio? Tute ne, sed eble ĝi estu.

Leono: Laodoro de teo dum varma taso estas inter viaj manoj, mmmmm.

Virgulino: Kiel ni certas, ke landaj asocioj ne tute elpensas siajn membronombrojn?

Pesilo: Vi havas kvindek elcentojn da ŝanco por pariĝi kaj kvindek ricevi nean respondon.

Skorpio: Tio povas esti la komenco de bonega periodo en via vivo. KREDU MIN.

Agata: Mi aĉetos por vi trinkaĵon kaj tiel vi povas rakonti ĉion al mi! Pri kio temas?

Sagitario: Do kio estas la problemo? Serioze, kio estas via problemo?

Kaprikorno: Mi esperas, ke vi havas ankoraŭ forton en la brakoj por aplaŭdi.

Akvisto: Ni ne forgesu pri la nokta ludado, trinkado kaj dancado!

Fiŝoj: Ni ĉiuj estas homoj sur la tero, kiuj bezonas amon por vivi.

Programo

	<u>Mangejo</u>	<u>Ekstere</u>	<u>Scenejo</u> <u>Kunsidejo</u>	<u>Lernejo</u>	<u>Gufujo</u>
08:00	Matenmanĝo				
09:00		Tajĵi			
10:00		Kurso por	Klimata justeco	(Komputila)	
11:00	AMO-seminario	progresantoj		tradukado	
12:00	Tagmanĝo				
13:00					
14:00		Ultima frisbeo	Salsa Volontulado		
15:00			Energia krizo en		Estontaj aranĝoj
16:00	Kia pluramemulo?		Eŭropo	Itala lingvo	
17:00		Grupfoto			
18:00	Vespermanĝo				
19:00					
20:00			Muzikalo		
21:00			June kaj kune		
22:00	Trinkejo		Klimata diskejo		Gufujo